

## **REKORDA SUMOO**

### **ILEI GRATULAS**

Altestimata HORI san

Aperis statistiko pri la novembra SUMOO, kun mirinde alta partoprenantonombro.

ILEI gratulas vin.

Vi elektis tre interesan strategion por obteni, ke homoj legu libron. Kopiante la strukturon de la sumoo-ĉampionado en Japanio (sesfoje jare ili konkuras dum du semajnoj), vi imagis la saman kalendaron kaj sugestas al esperantistoj lukti kontraŭ si mem legante libron laŭ la mem decidita ritmo. Neniu devas lukti kontraŭ dika peza sumoisto, neniu devas ŝviti, neniu riskas vundiĝi, nur legi la libron, kiun la leganto mem elektis. Ruza maniero !

Plie vi prizorgas precizan kolekton de la rezultoj kaj analizon de tiuj ciferoj.

Kaj fine vi trovis helpantojn por rilati kun la plurcentoj da legantoj kaj kuraĝigi ilin dum la legado.

ILEI aŭspicias la Esperanto-Sumoon kaj feliĉas pri ĝia ekzisto. Evidente la celo de Sumoo kongruas kun la celoj de ILEI.

La Esperanto SUMOO estas via eltrovitaĵo, via « bebo ». Admirinda afero en daŭra kresko. Gratulon denove ! Vi rajtas fieri pri via ideo.

Mireille Grosjean

Prez de ILEI